# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

***Volumo 49, Numero 4, Oktobro 2016***

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**

**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**



## Sidneja Lingva Festivalo






La 8an de oktobro 2016 okazis lingva festivalo en Sidnejo ĉe la Korea Kultura Centro. Richard Delamore bonvenigis nin kaj Jonathan Cooper salutis nome de la Aŭstralia Esperanto Asocio kaj la Federacio de Novsudkimrujo.





Ghil'ad Zuckermann estis la ĉefpreleganto kaj klarigis pri la avantaĝoj revivigi aborigenajn lingvojn. Trevor Steele prezentis Esperanton. Jonathan Cooper prezentis diversajn artefaritajn lingvojn.



Greg Cooper prezentis la hindian lingvon kaj ankaŭ la urduan kiu estas vere la sama lingvo, sed oni skribas la urduan per la araba alfabeto. Li rekomendis bonan libron pri lingvoj.



Alan Libert prezentis Vela. Ben Prist, Aŭstraliano inventis tiun lingvon meze de la naŭdekaj jaroj. En Vela ne povas esti du sinsekvaj konsonantoj aŭ sinsekvaj vokaloj. Ne estas vortoj kun pli ol 3 silaboj. Por krei kontraŭan vorton oni ne aldonas prefikson, sed inversigas la ordon de la literoj. "gud" signifas "bona", "dug" estas "malbona". Ankaŭ en la sekva kazo oni inversigas. "je" signifas "li" kaj "ej" signifas "lia".



Nicole Else prezentis la francan lingvon kaj provis montri kelkajn malfacilaĵojn de la lingvo, ekzemple mi klarigis kiam oni elparolas la finan "s" en "tous" kaj kiam ne. Ekzemple en tiu frazo "Ils ont tous leurs sacs". Se oni elparolas la finan "s" la frazo havas tute alian signifon ol se oni ne elparolas ĝin.

Ankaŭ okazis prezentoj de kelkaj aliaj lingvoj kiel Klingono, la tamila, la hebrea kaj la portugala. Kvankam ni troviĝis en la Korea Kultura Centro, iom strange ne okazis prezento de la korea lingvo. Fine estis tre sukcesa koncerto. Du neEsperantistoj kantis unu kanton en Esperanto.

Sekva lingva festivalo okazos en Ryde la 12an de novembro 2016. www.languagefestival.org/ryde/

## Arta ekspozicio kaj pica vespero en Esperanto Domo

La 29an kaj 30an de oktobro en Esperanto Domo okazis interesa evento. Vidu: www.youtube.com/watch?v=Djh-gCbGF6U

<u>Manlia Esperanta Klubo</u> ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

<u>Novkastelanoj</u>: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

<u>EFNSW: Estraranoj</u>: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 16:00

<u>La Meza Marborda Grupo</u>; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

<u>La Suda Marborda Grupo</u>; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922
<u>Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero</u> Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic.
Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

<u>La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo</u>: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 11:00 – 13:00 *(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*



| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Lushnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |

Aliaj Estraranoj: Richard Delamore, John Casey